Kulturdomo de Esperanto
Grésillon 49150 Saint-Martin d'Arcé

Kunvoko al Jarkunsido
la 12an de marto 2011 je la 14a, en Kastelo Greziljono

Jarkunsidon ni kunvokas pli frue ĉi-jare ĉar ni bezonas la konsenton de la societanoj koncerne gravan elspezon por hejti la teretaĝon kaj la unuan etaĝon jam ĉi-printempe. Antaŭ la jarkunsido mem, **je la 11a**, ni invitas vin al komuna cerbumado pri la statutŝanĝoj, kiujn oni proponu al venonta Eksterordinara Membrokunsido, tuj kiam eblos.
Matene, elektokomisiono nombros la voĉdonojn alvenintajn koresponde. Ĉiu societano, kiu ne povos mem ĉeesti, bonvolu sendi sian rajtigilojn kun nomo de sia ĉeestonta anstataŭanto. NB: kaze de sennoma rajtigilo, tiu ĉi validos por kalkulo de la kvorumo sed ne estos uzebla en voĉdonado mem.

Tagordo

Je la 14a00 : malfermo de la jarkunsido.
1) nombrado de ĉeestantoj kaj rajtigiloj por konstati, ĉu estas kvorumo
2) la komitato proponos al la jarkunsido voĉdoni por eksigo de XXX
3) evoluo de la nombro da societanoj kaj de la socia kapitalo
4) agadraporto 2010, kaj debato kun voĉdono (dumkunsida kaj perkoresponda)
5) financa raporto 2010, kaj debato kun voĉdono (dumkunsida kaj perkoresponda)
6) debato kaj voĉdono (nur dumkunsida) pri rezolucioj
7) debato kaj voĉdono (nur dumkunsida) pri buĝeto por 2011
8) ceteraĵoj

Konforme al artikolo 6 de nia statuto (« La jarkunsido rajtas eksigi membron, kies membreco iel malutilas la agadon de la Societo; kompreneble, la koncernato rajtas defendi sin antaŭ la jarkunsido »), kaj konsiderante, ke XXX malutilas la societon per minacoj plurfoje senditaj en registritaj leteroj al la novaj kaj antaŭaj komitatanoj de la kulturdomo kaj per akuzado de pluraj societanoj, la komitato proponos al la jarkunsido voĉdoni por eksigo de XXX el la societo.

Agadraporto 2010

La jaron 2010 karakterizas grava evoluo de la kulturdomo.
Fakte, la 30an de januaro 2010 okazis eksterordinara membrokunsido, kiu ebligis unuflanke lanĉi la juran reguligon, nome la registradon (devigan jam de 2002) de nia koopera societo, kun ties origina statuto (1951), en Registrejo de Komerca Tribunalo, kaj aliflanke organizadon de balotado por entute renovigi la komitaton. Registrado en Komerca Tribunalo efektiviĝis la 20an de majo 2010 (la unua atestilo K-Bis listigas la komitatanojn validajn la 30an de januaro 2010). La 29an de majo 2010, nova 12-membra komitato (inter kiuj la asocioj SAT-Amikaro kaj UFE) estis elektita. En ĝia unua kunsido, la 30an de majo, montriĝis la volo de la komitatanoj efektivigi agadplanon cele al pli larĝa malfermo de Greziljono, inkluzive al ne Esperantista publiko. Tial la komitato unuanime elektis plenan estraron kun prezidanto, kontraŭante la multjaran kutimon de antaŭaj komitatoj ne havi prezidanton. La nova komitato registriĝis la 6an de oktobro 2010 en Registrejo de Komerca Tribnualo.

Agadoj 2010

— De la 27a de aprilo ĝis la 1a de majo, staĝo « Esperanto laŭ matematika vidpunkto », gvidata de C. Rivière, kun Jannick Huet kiel staĝestro kaj kuiristo, kunvenigis 13 homojn.
— Dum kvar semajnoj da someraj staĝoj (17a de Julio ĝis 14a de aŭgusto) venis cent homoj: 61 staĝanoj (512 tranoktoj), 21 volontuloj (253 tranoktoj) kaj 18 vizitantoj. En kelkaj momentoj la kastelo aspektis plena, malfacilis trovi ĉambrojn por la staĝanoj. Kuirejon estris Lucette Echappé, kaj pro foresto de

antaŭviditaj volontuloj necesis salajri du homojn dum kvar tagoj: ni nepre planu estonte tian neceson salajri kuiristojn. Laboris kiel staĝestroj: Jeanne-Marie Cash, Xavier Godivier, Jannick Huet; kiel volontuloj por kuirado kaj mastrumado: Marie Daenen, Kazue Audibert, Louis Jeuland, Geneviève Gourichon, Armelle Piolat kaj Brigitte Ardon.

Georgo Handzlik donacis tri prezentojn de sia teatraĵo Ludoviko Lazaro kaj du muzikajn vesperojn; Tomasz Chmielik gvidis dum tri semajnoj tradukadon de verkoj de Privat. Estis proponataj trinivelaj kursoj (sed malmultis veraj komencantoj) kaj diveraj aktivaĵoj – astronomio, Tajĝiĉjŭano, teatro, librobindado, dansado, kantado (detaloj videblas en nia retejo).

— Tuj post la someraj staĝoj, grupo de 15 Rusoj trapasis du noktojn.

Kaj por konkludi 2010 :

— Jarfina festego de la 30a de decembro 2010 ĝis la 2a de januaro 2011 kun 20 ĉeestantoj. Brile mastrumis Armelle Piolat. Bondezira karto elpensita de Bruno Flochon, kune kun foto de la silvestra maskovesta balo, diskonigis novan aspekton de Greziljono

Ludonoj 2010

— La kastelo estis ludonita por du familiaj festoj maje kaj komence de julio, ankaŭ fine de aŭgusto por matematika olimpia staĝo de Animath (8 tagoj, 43 elektitaj lernantoj 12- ĝis 18-jaraj, gvidataj de 9 instruistoj) kaj por somera universitato de EDE, kiun vizitis 30 homoj dum 3 tagoj.

— La loĝejo 36 en kromdomo estis ludonita dum tri someraj semajnoj.

Bonteno de la bieno

— Unuaj modifoj en la elektra sistemo ebligis plialtigon de la uzebla elektra potenco, interealie uzadon de moveblaj elektraj hejtiloj por teretaĝaj salonoj dum la silvestra festego.

— Forĵeto de pluraj kubaj metroj de metalaĵoj kaj rubaĵoj dank' al helpo de nia najbaro, agrikultivisto, kiu krome ebligis forigon de mortintaj arboj falintaj dum vintro 2010.

— Malpliigo je pli ol duono de la laŭrheĝo laŭlonge de la pavimita aleo ĉe la kromdomoj, por tiel duobligi la larĝon de tiu ĉi aleo.

— Kontraktado cele al ekspluatado de la arbaro kaj vendo de brulligno.

Komunikado

— La retejo « gresillon.org » ampleksiĝis: eblas atingi per ĝi la protokon de ĉiu Ĝenerala Membrokunsido kaj la publikan version de la protokolo de ĉiu Komitatkunsido, kaj ekscii pri niaj diversaj agadoj.

— Pluraj artikoloj en Esperantistaj revuoj (*La Ondo de Esperanto, La SAGO, Le Monde de l'Espéranto, Esperanto,* ktp…), radio-elsendoj… Artikolo en la franca ekologia revuo *Silence*.

Planado por estonta pli larĝa malfermo

Komenciĝis klopodoj cele al malfermo de la kastelo al ne-Esperantistaj gastoj. Oni cerbumis, kiel modifi la strukturon por adapti ĝin al tia evoluo. Interalie ni kontaktis diversajn advokatojn por pristudi la eblecojn koncerne statutŝanĝojn aŭ eĉ strukturajn ŝanĝojn de nia societo. Ni rendevuis interalie kun "Gîtes de France", kiu povus proponi nian kastelon kiel lueblan gastlokon por grupoj. Ni ankaŭ negocas kun asocio, kiu deziras organizi jam ĉi-somere feriadon por infanoj en Greziljono.

Ni vizitis la urbestrojn de diversaj komunumoj: ilin interesas interalie plilongigo de « verda vojo » por biciklantoj kaj promenantoj (laŭ la eksa fervojo La Flèche – Saumur). Tiu ĉi verda vojo nun finiĝas kelkajn kilometrojn for de Baugé. Por profiti 6 pliajn kilometrojn ĝis Baugé, la komunumaro negocas kun deko da posedantoj, inter kiuj nia Kulturdomo, ĉar ni posedas 600 m de la eksa fervojo depost 1988. La turisma disvolviĝo estas prioritato de Baugé; tuj apuda golfejo planas konstruadon de granda hotelo kaj centoj da loĝdometoj.

La nova teamo kunlaboras en serena etoso, sed necesas prizorgi paralele gravan nombron da demandoj, kio postulas pli bonan dispartigon de la respondecoj inter pli multe da respondeculoj kaj plibonigon de niaj retaj rimedoj por komuniki. Tre kuraĝiga estas la konstato, ke la teamo ampleksiĝis de monato al monato, akceptante novajn kunlaborantojn. Mastrumadon kaj administradon de la Kulturdomo plenumas ne nur komitatanoj, sed ankaŭ helpantoj sinproponintaj en komisionoj aŭ kiel kunlaborantoj. Ni notu interalie la rimarkindan laboron faratan de Phil Freslon, anstataŭanto de SAT-Amikaro kiel komitatano, kiu loĝas relative proksime al Greziljono kaj gvidas la Esperanto-klubon de Baugé.

Financa raporto 2010

Ni ĝojas prezenti al vi profitan spezkonton je 1815 € post 8 sinsekvaj deficitaj jaroj. Ni komencas rehavi en 2010 rimedojn kaj kostojn kompareblajn kun tiuj antaŭ la fermo en 1998: enkalkulante la inflacion, ĉi-jaraj 40 138 € atingas du trionojn de la rimedoj de 1997. Tiun ĉi rezulton oni atingis unue pro veno de pli nombraj gastoj en Greziljono, sed ankau pro daŭra intensa volontula agado. Christian Vacheron tre efike plenumas la kasistan laboron de la kulturdomo. El liaj kontoj eblas atingi kelkajn gvidospezojn. Meze, ĉiu staĝosemajno enspezigis 1000 € kiel staĝ-aliĝoj, 2000 € pro loĝado, 3000 € pro manĝoj, 1000 € pro ceteraj enspezoj, kaj elspezigis 1300 € da manĝaĵoj. Cetere, ni pagis 1300 € por salajri dum kvar tagoj helpantinojn de la respondeculino Lucette Echappé.

Ni tamen memoru, ke la profitan rezulton 2010 ni atingis ankaŭ pro reiro al mezaj mastrumaj kostoj (2 274 €) kaj pro malgrandaj amortizoj (7 709 €, do preskaŭ duono de amortizoj 1997): tiuj ĉi ŝuldiĝas al malmulta renovigo de la kastelo jam de 10 jaroj. Dum venontaj jaroj, amortizo denove kreskos, kio influos la jaran spezkonton.

La malnova donaco de S-ino Baubonne, 7 622 €, kiu ĝis 2010 estis registrita kiel ŝuldo, nun aperas inter la pendantaj spezoj.

Agadplano 2011

a) Esperantista agado
- — Printempa staĝo kunlabore kun ILEI, kaj sesio de KER-ekzamenoj
- — 4 semajnoj de someraj staĝoj
- — ludono por FRINGOJ
- — ludono por FESTO
- — ludono por EDE

b) planataj renovigoj

En unua periodo, ekde 2011, ni celu plilongigi de 10 ĝis 20 semajnoj jare la uzadon de la kastelo, inter aprilo kaj novembro. Tiucele ni mendis prezproponojn por instali rapide hejtilojn sufiĉajn por tiu ĉi unua celo Pli detalan planon ĉi-rilate vidu en la **unua rezolucio**.

c) luado al ne-societanoj: ni daŭrigu negocadon kun « Gîtes de France » (vd **duan rezolucion**) kaj kun teatro-lernejo, kiu vizitis nin kun projekto lui la kastelon dum dek monatoj (vd **trian rezolucion**).

d) ŝanĝo de statuto: ni preparu novan statuton kaj akceptigu ĝin jam ĉi-jare (vd **kvaran rezolucion**).

REZOLUCIOJ

Konstrulaboroj

Jam en marto 2010, ni pridemandis Claude Bensimon kaj Francis Lasson, kiel eblas pli hejti la kastelon por uzi ĝin ne nur somere. Ilia propono ebligas kiel unua ŝtupo plilarĝigi la uzperiodon inter aprilo kaj novembro, per elektra hejtado de teretaĝo kaj unua etaĝo, kaj eksperimenti tion en 2011 kaj 2012. Parto de la kastelo estas jam hejtata per mazut-hejtilo, kies vintra ŝparreĝimo kaŭzis kelkajn zorgojn. Elektra hejtado estos malpli forta kaj ne sufiĉos se la ekstera temperaturo iĝos malpli ol 5° C. Kiel unua paŝo, la Komitato mendis 2830 € urĝan konformigon de la ekzistanta elektra instalaĵo kaj plialtigon de la disponebla potenco. Dua paŝo estos la konformigo kun sekurecaj reguloj (ŝanĝo de la koridoraj helplumoj) kaj instalado de hejtiloj por la tutaj teretaĝo kaj unua etaĝo kaj parto de la kromdomoj.

Krom tiu ĉi plano, kiuj konsistigos la plej gravan elspezon, oni intencas pliajn renovigojn, unuavice:
— pro sekureco : plifirmigo de la balkono de ĉambro 3, plifirmigo de la trabaro sub ĉambro 34 (en kromdomo), kreo de fenestro por ellasi fumon kaze de fajro, super la ŝtuparo de la dua etaĝo,

— pro leĝa devigo : anstataŭigo de la malnova kuvego por mazuto subtera per surtera kuvego
— por konservado de la konstruaĵoj: likimunigo de la verando, kreado de klappordoj en la plafono al la norda turo por ebligi riparon de konstateblaj likoj.
— por ebligi aliron al handikapuloj: almeto de dekliva rulkrado antaŭ la pordo de la verando.
Nunaj disponeblaj monrimedoj ebligas realigi tiujn ĉi konstrulaborojn sen pruntado de mono.

Rezolucio 1: **La jarkunsido aprobas la efektivigon de konstrulaboroj ĝis la sumo indikita en la buĝeto 2011, interalie por instalado de hejtiloj, kiuj ebligu malfermi la kastelon inter aprilo kaj novembro.**

Luado

La komitato elektita en majo 2010 klare antaŭvidis en sia agadplano malfermi la kastelon al ne Esperantistaj grupoj, por ekvilibrigi ĝiajn spezojn. Tio ĉi unue levas juran problemon: adapto de nia statuto tiucele, sed ni pridemandis diversajn advokatojn kaj tiu ĉi kondiĉo ŝajnas plenumebla, kondiĉe ke tion deziru sufiĉa plimulto da societanoj. Pluraj eblecoj estas nun studataj. Cetere, ni jam rendevuis kun « Gîtes de France », kaj kun turisma oficejo de Baugé. « Gîtes de France » povus registri la kastelon kiel duspikan gastlokon por grupoj ĝis 24-homaj, postulante ne tro da normigaj plibonigoj.

Rezolucio 2: **La jarkunsido petas daŭrigon de la negocado cele al luado de la bieno kiel gastloko por (ne Esperantistaj) grupoj.**

Teatra lernejo

Teatra lernejo « Morgaŭ la Printempo » venis al ni por proponi planatan teatr-instruadon, kiu okazu Esperantlingve dum dek monatoj (inter septembro 2013 kaj junio 2014), por 27 staĝanoj el la 27 landoj de Eŭropa Unio, gvidataj de seso da respondeculoj plus instruantoj laŭ la programo. Tiu ĉi plano povos efektiviĝi nur kun gravaj subvencioj de Eŭropa Unio, naciaj kaj lokaj kolektivumoj. La organizantoj opinias Greziljonon taŭga por sia projekto. Antaŭvideblas malfacilaĵoj: unue la ĉi-jare planata hejtado ne sufiĉos por loĝi en la kastelo kun minimuma komforto dum malvarma sezono, due tio devigas rezigni aliajn projektojn dum la koncernaj monatoj. Kiel favoraj argumentoj: temas pri escepta kaj plene Esperantista projekto, forte subvenciota, kiu kontribuus konatigi Greziljonon. La organizantoj ne malpermesas, ke ni samtempe uzus mem la kastelon, ĉu por aranĝoj bezonantaj malpli ol la restantaj litoj, ĉu en kelkaj semajnoj, dum kiuj ili pretas ferii ekster la kastelo. Unua decido estu, ĉu ni konsentas daŭrigi la negocadon por precizigi la proponon, kiun Greziljono povus fari al « Morgaŭ la Printempo », kaj rajtigi « Morgaŭ la Printempo » mencii Greziljonon en siaj subvencipetoj, kiujn ili devas komenci ekde nun.

Rezolucio 3 : La jarkunsido principe konsentas, ke la komitato negocu lukontrakton kun « Morgaŭ la Printempo » inter septembro 2013 kaj junio 2014.

Statutŝanĝoj

Depost 2008, oni cerbumas por adapti la statuton al aktuala bezono de la Kulturdomo, interalie koncerne ĝisdatigon de la societanaro kaj valoron de la socia kvoto, koncerne proceduron de jarkunsidoj kaj funkciadon de la komitato, kaj pri devigaj financaj rezervoj. Krome, en 2010 la societanoj esprimis volon malfermi la kulturdomon proponante akcepton de pli vasta publiko, kaj tio ĉi postulas statutŝanĝon. Fine, necesas evoluigi la socian kapitalon por akordi ĝin kun la jamaj evoluoj de la listo de societanoj.

Rezolucio 4 : La jarkunsido konsentas, ke la komitato entreprenu, kun helpo de juristo kaj librotenisto, redaktadon de nova statuto por nia konsumcela koopera societo, tiel ke eblu proponi servojn al ne-societanoj kaj ĝisdatigi la socian kapitalon.